# Saluto-kanto (por tuttera infanaro kaj plenkreskuloj tie kaj tie)

Kepo estas
sur la kapo –
en miaj manoj
estas mapo.

**Haŭ, saluton!**
**Ĉaŭ, saluton!**
**Hej hop saluton!**
**Kepsaluton!**

Absolutan
korsaluton!
Aŭ: cepsalatan
kapsaluton!

Hej, sijamboĥ[1]
al vi ambaŭ
Bonon kaj belon
tuj aŭ baldaŭ!

Ritsaluton
lokkonforman!– ,
Ritan saluton
reverencan!

Ridsaluton
hej (tre) dubsencan
ridan saluton
eĉ sensencan!

Post-long-dorman!
veksaluton
post-eksalutan
trasaluton

Jen promena
okulsigno
por vin saluti
kun plen-digno!

Ne adiaŭ!
Ĝis revido!
Ĝis postmalfida
malmalfido!

Gajajn dancojn
ĝislaciĝajn!
Kaj: korfeliĉon
ĝisrevidan!



Ĉapsaluton!
Kepsaluton!
aŭ – nur perukan
kapsaluton...

Verte mi vin
jen salutas,
mane kaj frunte
resalutas.

Certe mi vin
kvin salutos!
kvinfoje ĉiun
klinsalutos!

(Se nur flustre
mi salutus,
eble el lud' vi
min ekskludus!)

Kapsaluton,
Kepsaluton,
Levu la mapojn!
Mapsaluton!

Bum, saluton.
al vi, ĉiom,
ne salutadu,
knabo, tiom!

Haŭ, saluton!
Ĉaŭ, saluton!
Hej hop saluton!
Rapsaluton!

Rabsalutoj
estas tristaj .
la retsalutoj
estas miksaj.

Iuj volus
repsaluton!
Nordo salutu
rete sudon.

Jen ĉe fino
finsalutu
ĝis (la) revido
ne salutu

Retsalute
mi informas:
vin ke jam preskaŭ
ĉiu dormas.

Bonan nokton
se mi diras -
bonan matenon
mi kunfidas.


[1] Feliĉon al vi , kun modifeto de la Svahila vortoformo sijambo.

# GLOSOJ


***Haŭ, saluton***!: varma saluto al ĉinaj kaj ne-ĉinaj esperantistoj , plenkreskuloj kaj infanoj

***Ĉaŭ!*** - malofta, junulara salutformo; titolo de junulara retpaĝo
Si**jam**boĥ! –: mia salutvorto al sud-afrikaj kaj aliaj esperantistoj, pli aŭ malpli kreskintaj
***Kapsaluton!*** – mia saluto al najbarĉambraj esperantistoj
***rid-saluto*** - saluto de knabino al knabo
***morgaŭ***: (tuj) post hodiaŭ

***kepo:*** ĉapo ekzemple de soldatoj



***peruko*** – falsa hararo de homo



## ♫ Melodio:

(supra) do' sol sol mi,
do' sol sol mi
fa fa sol la sol
re re re do